

PREPOZICIA VIVO; RECENZO PRI THOMAS A KEMPIS <sup>1)</sup>

far D-ro Inĝ-o G. HAMMING.

## 1. Venki sin mem.

Ĉi tiun jaron pluvegis kaj pluvadis en multaj partoj de la mondo. La malgajno pro veteraj influoj estis grava multloke, ofte perdiĝis la vivoj de multaj homoj.

Same sur la planedo Marso la vetero estis malbona; vidiĝis multego da nuboj. Laŭ supozo de veteristoj la suno influis la veteron. Estis preskaŭ neniu sunmakulo, tio indikas ke la intenso de la sunradiado ne estis normala ktp.

Mezepoke estis multaj katastrofoj en Eŭropo, pestoj kaj militoj. Tiam ili pensigis pri Dia kolero. Novvenis moviĝoj riproĉantaj la misaĵojn en la eklezia praktiko; kelkuloj protestegis ĝis finfine per la Reformacio la kristanaro disrompis sin. Sub influo de la evidenta kolero Dia oni fanatike batalis la Katolikan eklezion, aŭ same fanatike bruligis kaj turmentegis la herezulojn. — Ĉion por eviti la evidentan malgracon Dian.

Apenaŭ oni povas imagi la karakteron de tiu epoko. Granda estis la distanco inter nobeloj kaj ceteruloj. La nobeloj mem estris siajn landetojn, daŭre batalante kaj edziĝante pri la limoj; ili timadis siajn kolegojn kaj konkurenulojn. Danĝerulojn kaj senkulpulojn oni fitraktis en karceroj aŭ malestigis iel ajn. Inter la landestroj estis episkopoj kaj aliaj ekleziuloj; ankaŭ ili pligrandigis siajn terenojn iel ajn.

En tiu mondo la kolero de Dio estis evidenta; la eklezio putradis. Sed kunekzistis aliaj fortoj, rememorigantaj ke la bazo de la eklezio estas la sufero de Kristo. Kontraŭ la koruptiga potencemo la sanktuloj atestis sie; ili forlasis la mondon malagnoske la deziron. Tiu ekzemplo instigis al Thomas a Kempis (Tomo Kempano); li fariĝis monaĥo, — liaj gepatroj estis riĉetaj.

Por Thomas la vivo ne estis facila. Jam estas sinofero forlasi la mondajn honorojn; aliajn malfierigojn Thomas devis akcepti. Li eniris la saman monaĥejon kiel lia frato antaŭe. Laŭ la statutoj li tial bezonis specialan aprobon; ĝi prokrastiĝis ĝis post preskaŭ sep jaroj. Tiom bezone adis la novictempo de Thomas. Imagu la situacion: Sagaca junulo el riĉeta medio forlasis la mondajn ĝuojn kaj ne atingas la monahan ĝuon: oni ne akceptas lin. Verŝajne fortigis tiu sperto la rezignemon de la novico. Nu, por atesti pri rezignemo la prasanktuloj jam sidadis, sur siaj kolonoj; Thomas verkis libron kun rezignema baztono.

Al ni la libro konigas mezepokan monaĥon, liajn opiniojn kaj sentojn. Ĉar la libro tre disvastiĝis en monaĥejoj ĝis la nuno ni verŝajne rajtas supozoj ke ĝi iom konigas la monaĥon ĝenerale. Tiun opinion substrekas la impresoj, ke temas pri instrulibro por novicoj; Thomas estis novicestro en la monaĥejo.

<sup>1)</sup> Vidu Sc. Rev. 6, 153.

En la libro tio evidentiĝas sur paĝo 69 (libro I, ĉap. 25, 1) „Restu fervora kaj diligenta en la servo de Dio, kaj ofte pensu por kio vi venis ĉi tien, kaj kial vi forlasis la mondon“. Same sur p. 219 (III 45,2) „Homoj ni estas, kaj nenio alia ol homoj malfortaj ni estas, kvankam multaj nin kredas kaj nomas anĝeloj“.

Malarogemo, modesto, malfiero, humilo, — kiu povas precize distingi ĉi tiujn nociojn? Pro la arogaĉemo de la potenculoj la piuloj serĉas la humilecon. Tia sento montriĝas per jena diro sur p. 173 (III 22,2) „tiu estas la plej granda kaj la plej bona, kiu al si mem atribuas plej malmulte, kaj kiu en la dankesprimado estas la plej humila kaj la plej fervora. Kaj kiu el ĉiuj sin estimas la plej signifa, kaj sin juĝas la plej malinda, tiu estas la plej taŭga por ricevi donojn pli grandajn“. La citaĵo ne vidigas la humilecon, kiun Thomas sur p. 264 (III 58,3) citas el Mat. 18:4 nome „kiu do humiligos sin, kiel ĉi tiu infano, tiu estos la plej granda en la regno de la ĉielo“. Infanoj sanaj estas kamaradaj, ili ne volas apartigi sin per fiereco: tial Jesuo montras ilin kiel ekzemplon de humileco. Tamen sana, senkomplika infano ankaŭ ne apartigas sin per malfiereco; ĝuste tion postulas Thomas.

Ankaŭ legu sur p. 153 (III 14,2) „indignu kontraŭ vi mem, kaj ne toleru, ke ia malhumileco en vi vivu; sed montru vin tiel submetita kaj malgranda, ke ĉiuj povu marŝi sur vi, kaj piedpremi vin kiel koton de la stratoj“.

Arogemo, fiereco, konkeremo, krueleco, turmentemo, — ili fontas el homaj inklinoj. Venkante ilin la homo devas venki inklinojn siajn. Thomas volas venki inklinojn, ne nur la aĉajn, sed ĉiujn. Cite mi jam vidigis ke Thomas volas mortigi la bezonon je ŝatateco. Ankaŭ la plezuron, la simplan ĝojon oni venku; sur p. 55 (I 21,3) legiĝas „Justulo ĉiam trovas sufiĉajn kialojn por malĝoji kaj plori“.

La sinvenko estu kompleta, oni devas dispremi la propran koron: „mi ne volas konsolon, kiu forprenas de mi la kordispremiĝon“ tekstas frazo sur p. 104/5 (II 10,1). Eĉ la korpaj bezonoj estas venkindaj (p. 73; I 25,3): „Ho se neniam vi bezonus manĝi, trinki, nek dormi; sed ĉiam povus laŭdkanti al Dio, kaj okupi vin nur per spiritaĵoj ekzercoj; tiukaze vi estus multe pli feliĉa ol nun, kiam vi, pro kiu ajn bezono, devas servi vian korpon!“

Oni rezignu pri siaj deziroj, oni same rezignu pri la kunhomo. Estas pli bone forlasi lin. Jen kelkaj citaĵoj:

„Ne estu familiara kun kiu ajn virino, sed rekomendu ĝenerale ĉiujn bonajn virinojn al Dio. Nur kun Dio kaj Liaj Anĝeloj deziru esti intimaj, kaj evitu esti konata de homoj. Amon oni devas senti por ĉiuj, sed intimeco ne konvenas“ (p. 26; I 9, 1/2).

„La naturo kliniĝas al kreitaĵoj, al sia propra karno, al vantaĵoj kaj distraĵoj, sed la graco tiras al Dio kaj al virtoj, rezignas pri kreitaĵoj, fuĝas la mondon, abomenas karnajn dezirojn, malmultigas eliradojn, hontas por aperi en publiko“ (p. 247; III 54,2).

De la sacerdoto la „konversacio ne devas esti kun la popolo kaj sur mult-homaj vojoj; sed kun la Anĝeloj en la ĉielo, aŭ kun viroj perfektaj sur la tero” (p. 297; IV 5,2).

„Tiel vi devas esti morta je tia afekcio al personoj amataj, ke, kiom de vi dependas, vi dezirus esti sen ia homa interrilato. Des pli homo alproksimiĝas al Dio, ju pli li foriĝas de ĉiu konsolo homa” (p. 213; III 42,2).

Jen do grava vidpunkto: Thomas evitas homan konsolon por ricevi la konsolon de Dio. Konsolo, — centra nocio el la libro de Thomas. La Franca nomo de la verko estas „*La Consolation Intérieure*”, „la konsolo interna”.

Prenu Plenan Vortaron kaj kontrolu, kio estas konsoli: mildigi ies ĉagrenon, bedaŭron, doloron kaj reesperigi lin per afablaj kuraĝigaj paroloj. Por ricevi konsolon oni bezonas ĉagrenon, doloron, suferadon. Konsolon oni devas ricevi malprene, la necesan ĉagrenon oni povas prepari por si mem. La monaha ĉagreno estas la maladaptiĝo societa. Ĉagrenon trovu Thomas, piedpremiĝon, enkotiĝon kaj solecon. Inter ili la soleco estas la granda doloro. Soleco, — „saŭdo” diras Lorenz en sia *Diverskolora Bukedo*, — saŭdo: nostalgio. Nu, ĉe Thomas konsolo estas malsaŭdo; cetere ne nur ĉe Thomas. „Ve ankaŭ al vi, riĉuloj, ĉar vi jam ricevis vian konsolon” citas Thomas el Luk. VI. 24 (p. 264; III 58,3).

Kiel do Thomas venkas la nostalgion kaj trovas malsaŭdon? Jene: „Pia homo ĉie kunportas sian Konsolanton Jesuon, kaj diras al Li: Sinjoro Jesuo, estu kun mi en ĉiu loko kaj en ĉiu tempo. Ĉi tiu estas mia konsolo: volonte deziri malhavi ĉiun konsolon homan” (p. 159; III 16,2).

Iomete ni jam komprenas: Thomas ne senplie rezignas pri la ĝuoj, rekompenca konsolon li volas gajni per sia ago. Sintrompo iom minacas: „Ni do humiliĝu niajn animojn sub la mano de Dio en ĉiuj tentoj kaj ĉagrenoj, ĉar: Li savos kaj altiĝos (I.G.H.) la humilajn en spirito” (p. 36; I 13,6).

Kion do Thomas serĉas, ĉu humiliĝon, ĉu altiĝon? Kelkfoje Thomas serĉas nur resti ekster la infero: „Bone tamen estas ke, se la amo vin ne deturnas de la malbono, almenaŭ la timo al la infero vin retiru” (p. 69; I 24,2). „Por ke vi do povu eviti la punojn eternajn, klopodu pro Dio pacience toleri la nunajn suferojn” (p. 149/50; III 12,1).

Sed pli rivele diras Thomas siajn opiniojn: En la infero „la luksemuloj kaj la voluptemuloj estos surverŝataj per ardanta peĉo kaj malbonodora sulfuro; kaj kiel furiozaj hundoj la enŭuloj ululos pro doloro ..... Tie unu horo en puno estos pli netolerebla, ol ĉi tie cent jaroj en plej severa pentofarado ..... en la juĝotago ..... la justuloj staros kun granda konfido kontraŭ tiuj, kiuj ilin malestimis kaj subpremis. Tiam leviĝos por juĝi, kiu nun humile submetiĝas al la homaj juĝoj. Tiam grandan konfidon havos la malriĉulo kaj la humilulo; kaj ĉiuflanke tremos la fierulo” (p. 66/7; I 24,2). Jen do. Thomas volas rezigni pri la batalo por honoro kaj potenco, li serĉas senhonorecon. Ami la tutan homaron li volas, kaj venki koleron pro maljustaj travivaĵoj. Sed

fakte li akaparas malamegojn kontraŭ la socio kaj la homoj; li jam aŭdas la ululadon, jam plezuras esti la juĝanto, kiu tremiĝas la fierulojn. Ja tial Thomas volas esti piedpremata, ĉar li atendas esti mem kondamnanta juĝisto.

Ĉu ni daŭrigu per la facila konkludo ke Thomas estas lerta trompisto? Tamen ne. Li scias ke „multaj serĉas sekrete sin mem en tio, kion ili faras, kaj ne scias tion” (p. 37; I 14,2); kono de ĉi regulo ankoraŭ ne savis lin. Verŝajne li ofte spertis tiun veron ĉe si, klopodadante korekti la eraron, sed nescie li faradis aliel saman eraron. Volante perfortadi sian animan strukturon oni iel malsukcesas. Kelkfoje Thomas blindis pri siaj misiroj, ofte li bedaŭre kaj senluziigite parolis pri ili. Jen kelkaj ekzemploj:

„Ĉar sincere mi konfesas: ke ordinare mi estas multe distrita (= senatenta G.H.)” (p. 229; III 48,2).

„Sed se Vi Vin retiras, kiel Vi tre ofte faras, tiam li (la servisto de Dio G.H.) ne povas kuri laŭ la vojo de Viaj leĝoj” (p. 236; III 50,1).

„Kial do mi ne ekflamiĝas pli ĉe via adorinda ĉeesto; kial mi ne preparas min pli zorgeme por ricevi viajn sanktajn misterojn; dum tiuj antikvaj sanktaj patriarkoj kaj profetoj, ankaŭ reĝoj kaj princoj kun la tuta popolo, montris tiom da grandaj pieco kaj fervoro por la dia kulto?” (p. 281; IV 1,2).

„Gemu kaj malĝoju pro tio, ke vi ankoraŭ estas ..... tiel ofte envolvita en vantaj fantaziaĵoj, ..... tiel facilanima je ridoj kaj distraĵoj, tiel malinklina al ploro kaj malĝojo, ..... tiel scivolema por aŭdi novaĵojn kaj vidi belajojn, ..... tiel dormema dum la sankta noktoreĝo; tiel dezirema al la fino, ..... tiel senfervora celebrante, tiel malvarma ĉe la komuniĝo; ..... tiel ofte faranta multajn bonajn decidojn, kaj tiel malofte ilin efektiviĝanta” (p. 300/1; IV 7, 1).

Plej klare vidiĝas la senluziigo sur p. 322/3 (IV 14, 1/2): „Kiam mi pensas pri kelkaj piuloj, kiuj, Sinjoro, kun plej grandaj pieco kaj fervoro alproksimiĝas al via Sakramento, tiam mi forte konfuziĝas kaj ruĝiĝas, ĉar mi tiel senfervore kaj tiel malvarme alproksimiĝas al via altaro kaj al la sankta Komunio, kaj mi restas tiel seka kaj indiferenta je koro, kaj mi ne estas tute ekflamiĝinta antaŭ Vi, Dio mia, kaj ne tiel forte altirita kaj ekscitita, kiel multaj piuloj estis, kiuj pro grandega deziro al la Komunio kaj sentebla amo de koro, ne povas reteni siajn larmojn ..... Estu al mi favora, ho bona, dolĉa kaj aminda Jesuo, kaj donu al via mizera almozulo, ke li sentu almenaŭ kelkfoje iom de tiu kora intimeco de via amo en la sankta Komunio, por ke mia kredo pli kaj pli fortiĝu, mia espero je via boneco kresku, kaj mia amo, unufoje perfekte ekflamiĝita, kaj gustuminte la ĉielan manaon, neniam plu malfervoriĝu”.

## 2. Tempo kontraŭ Dio.

„Prepozicia vivo” estas la titolo de ĉi recenzo. Ĝi memorigas pri artikolo mia en Sc. Rev. 6 26. En tiu artikolo videblas la diferenco inter prepozio kaj

verbo: prepozicio kunluas strukturajn, verbo metas ĝin en la tempon. Nu, ĉe Thomas la malo de Dio estas ne diablo, sed la tempo. Eternulo estas Dio, ĉi tiuj konstatoj estas malsilosiloj por kompreni Thomason. Jen kelkaj citaĵoj: „Demetu ĉion ŝanĝigeman, serĉu la eternan. Kio estas ĉiuj tempaĵoj, se ne delogajo?” (p. 122; III 1,2).

„Ĉar ĉiu gloro homa, — ĉiu honoro tempa, — ĉiu grandeco monda kompare kun via gloro eterna: vantajo estas kaj malsaĝeco” (p. 211; III 40,2).

„Ĉar vi ne povas interrilati kun Mi, kaj samtempe amuzi vin per pasemajoj. De konatuloj kaj amikoj vi devas vin apartigi, kaj teni vian animon senigita de ĉiu aĵo tempa” (p. 243; III 53,1).

„Kelkaj ĉiam havas Min en la buŝo, sed malmulte en la koro. Estas aliaj kiuj, lumigite en spirito kaj purigite en afektoj, ĉiam sopiras al aĵoj eternaj, nevolonte aŭdas pri aferoj surteraj, kun malĝojo plenumas la necesajn de la naturo” (p. 130; III 4,2).

Jen nova lumo falis sur la motiva kial Thomas evitas amikojn kaj terajn ĝuojn, kial li abomenas manĝi kaj urini. Ĉio kaj ĉiuj estas tempaj, pasemaj.

Teorion serĉas Thomas. Te-orio estas Grekdevena vorto, same kiel teologio, te-okratio; ĝi signifas „dionvido”. En la teorio oni vidas la maltempon, Dion. Laŭ Platono la efektivo estas ombro de la ideoj; laŭ hodiaŭaj opinioj la nocioj estas resumo el la faktoj. Ankoraŭ en la Mezepoko la faktoj devis obei la *naturleĝojn*, nun tiuj leĝoj devas obei la faktojn. Por kompreni Thomason oni konsciu la grandan diferencon inter ambaŭ vidpunktoj. Se ni, sciencistoj, trovas novan fakton ni ĝojas ĉar ni povas plibonigi la teorion; se Thomason trafis nova fakto, li malĝojis, ĉar tiu fakto ĝenis la *kontempladon*: la mergiĝon en la belecon de la teoria, dionvida skemo.

Ĝuste tial Thomas evitas la tempaĵojn, ĉar ili ne laŭas la teorion, ĝuste tial li volas liberiĝi eĉ de si mem. Thomas serĉas konsolon, malsaŭdon, li trovas ĝin en la teorio; tiom ofte li ripetadas la teoriajn formulojn, ke ili regas lian tutan afekcion animan.

„Ho, kiam estos al mi donate, esti tute senigita de mi mem, kaj „vidi kiom dolĉa estas Vi, Sinjoro, Dio mia”? (Ps. XXXIII, 9). „Kiam mi estos tute absorbata en Vi, tiel ke pro Vi, mi ne sentas min mem, sed nur Vin sola super ĉiu sento kaj mezuro, je maniero nur al malmultaj konata” (p. 169/70; III 21,2).

Tute perforti la naturon ne eblas: la konsolo per la dionvida teorio ricevas seksajn kvalitojn. Thomas „ĝuas tiujn dolĉajn ĉirkaŭbrakojn, kiuj ĉiam estas al la disono de la spiritoj beataj” (p. 170; III 21,2). Tiuj ĉirkaŭbrakoj konkretiĝas sub la formo de la komunio: „Mia animo sopiras al via korpo, mia koro deziras unuiĝi kun Vi. Donu Vin al mi, kaj tio sufiĉas; ĉar ekster Vi neniu konsolo valoras” (p. 289; IV 3,1). La spirito kiu pie ricevas sian Sinjoron estas feliĉa, tiu animo benita. „Ho kiel grandan Sinjoron ĝi ricevas, kiel amindan Gaston ĝi enloĝigas, kiel agrablan Konulon ĝi akceptas, kiel

fidelan Amikon ĝi alprenas, kiel belegan kaj noblan Fianĉon ĝi ĉirkaŭbrakas” (p. 291; IV 3,2).

Ĉi tiaj partoj mistikaj estas verkitaj per plej entuziasma lingvo: en la traduko ili ofte kantiĝas. Laŭ mia gusto la stilo estas preskaŭ delira.

Prepozicia vivo mi nomas la sintenon de Thomas. Li serĉas kazojn, ne okazojn. La kazoj ne prenu lokon en la tempo. Thomas am homaro, bela ideo; sed Thomas ne amas la homojn; Thomas am homoj scias ke intimeco ne decas. Thomas sen deziroj, bela iluzio, — sed Thomas ne senas je deziroj: li estu la juĝonto, la piedpremitoj estu en fajro sulfura.

Decidi ne konformas al prepozicia vivo: decidanto aliigas. Eĉ se iu decidus promeni, io okazos; li aliigos sian lokon. Thomas timis decidi, kvankam li certe estis kapabla homo; li preferis esti sub aŭtoritato de aliuloj.

„La amo estas submetita kaj obeema al superuloj” (p. 134; III 5,2).

„Penadu, filo, fari prefere la volon de aliulo ol la vian ..... Ĉiam serĉu la lokon plej malaltan, kaj esti sub aliuloj” (p. 175; III 23,1).

„Kiel vi povas alimaniere esti mia, kaj Mi via, se vi interne kaj ekstere ne estas senigita de ĉiu propra volo?” (p. 205; III 37,2).

Ĉefajo estas ke la propra volo de Thomas malestiĝu. Laŭ mia opinio estas iom naive, ne kompreni ke superulo jes devas havi volon kaj decidemon por ke li povu ordoni. Thomas simple akceptas superulon kiel anstataŭanton de Dio.

Ankaŭ nun ni devas konstati ke Thomas mistaksas siajn povojn; estas peza tasko por li obei. Li persistas pro la ĉiela rekompenco:

„Estas apenaŭ io, en kio estas tiel necese morti je vi mem, ol kiam vi vidas kaj suferas tion, kio estas kontraŭa al via volo; sed precipe kiam oni al vi ordonas fari tion, kio al vi ŝajnas malprudenta kaj malpli utila ..... Sed konsideru, filo, la frukton de ĉi tiuj penoj, la baldaŭan finon kaj la grandegan rekompencan, kaj vi ne havos de tio ĝenon, sed fortan konsolon de via pacienco. Ĉar por ĉi tiu ereto de via volo, pri kiu vi nun spontanee rezignas, vi ĉiam havos vian volon en la ĉielo” (p. 233/4; III 49,2).

Prepozician vivon serĉas Thomas; ĝi estu senokaza, senfakta, senemocia, stabilega. Nune ni scias ke la sciencan tre ĝenadis tiu idealo. Daŭre la scienco batalis kontraŭ dogmaro kaj tradiciemo. Thomas antaŭscias tion kaj malpreferas la sciencan.

„Ju pli multe kaj pli bone vi scias, des pli severe vi pro tio estos juĝata, se vi ne estos vivinta pli sankte. Tial ne fieru pri iu arto aŭ scienco; sed prefere timu pri la al vi donita kono” (p. 16; I 2,1).

„Se via opinio estas bona, kaj vi ĝin pro Dio forlasas, sekvante alian, de tio vi multe profitos”; jen tre stranga aserto sur p. 27 (I 9,2). Ĉu Dio povus deziri forlasi opinion bonan?

Plej malkaŝaj estas jenaj citaĵoj:

„Vi devas gardi vin kontraŭ scivola kaj senutila esploro rilate al ĉi tiu

nesondebla Sakramento, se vi ne volas submergiĝi en la abismon de dubo ... Felĉa simpleco, kiu forlasas la malfacilajn vojojn de la problemoj, kaj plue iras sur la glata kaj firma vojeto de la ordonoj de Dio ..... Kredo estas postulata de vi, kaj sincera vivado, ne alta intelekto aŭ profunda scio de la diaj misteroj" (p. 331; IV 18.1).

La fino de la libro tekstas jene: „Se la diaj faroj estus tiaj, ke ili de homoj povus esti facile komprenataj, tiukaze oni ne povus nomi ilin mirigaj nek neeldireblaj" (originalo: eldireblaj) (p. 333; IV 17.2).

Ĉe Thomas la teoria skemo estas tro senokaza; nun li serĉas la sensacion ke ĝi estas miriga kaj neeldirebla. Thomas rifuzas kompreni la mondon, ĉar nekomprenata mondo pli imponas al li. Fakte tamen Thomas malatentas la efektivan mondon. Lia amata mondo nekomprenbla ekzistas nur en la tradicio eklezia.

### 3. Loko en la monda kulturo.

„La Imitado de Kristo ja ekhavis post la Biblio la plej multajn tradukojn kaj represojn el ĉiuj libroj de la mondo ..... Ni kuraĝas diri, ke ĝi en neniu katolika monaĥejo komunumo estas vane serĉata, kaj ĝi ĉeestas en ĉiuj katolikaj edukejoj, verŝajne eĉ en ĉiu pastrejoj kaj nenombreblaj familioj", — tion ni legas sur p. 8.

Mi kuraĝas diri ke la influo al la Nederlanda Calvinismo estas multe pli profunda ol la influo al la Katolikismo. Verŝajne la senpera influo ne estas granda, multaj ne legis la libron; tamen ĝi stampis la Kalvinanan tradicion.

Eble alia efiko estas pli grava. Mirigas ofte, ke la socia progreso stagnas en landoj kiuj nomiĝas Kristanaj. Multon ĉi tiu libro klarigas. Ĝi ja predikas la taskon silentigi siajn dezirojn pro Dio.

Generale direndas ke Thomas iris sian vojon ĝis absurdo; kaj ŝlosis la elekzion por multaj. Leginte la libron mi ekkomprenis la diraĉon ke religio estas opio por la popolo.

Ĉi tiu libro estas ŝatata de multaj personoj. Kial do? Imagu homon ne povanta sin teni inter la homoj. Li ne scias kiel konduti, li timas esti ridata. Eble li havas malplezurajn amsperton kaj ne kuraĝas komenci ree. Kiel ajn, li estas timema kaj havas ĉagrenon pro tio, saŭdon. Ek li legas la libron de Thomas kaj malkovras ke lia ĉagreno, lia timemo estas lia virto. Ju pli malproksima de homoj, des pli proksima al Dio. Konsolon internan li trovas, kie mankas la konsolo ekstera. Venki sian timemon li ne bezonas, nek trovi socian kontakton. El la socia malpovo li nur faru socian malvolon, kaj jen li estas preskaŭ sanktulo.

Ankoraŭ du citaĵojn mi donu:

„Se, libera de deziroj, egoismo kaj fiero, vivas hom' prudenta, certe trovos li la sanktan Pacon, kiu estas vivo dia, stato de feliĉo plena, kaj kiam la morto venos, li kun Dio unuiĝos".

„Ĉi tio, ho monaĥoj, estas la eminenta vero pri la sufero: naskiĝo estas sufero, malsano estas sufero, mortado estas sufero, kuniĝo al malŝatataj estas sufero, disiĝo de ŝatataj estas sufero, ne ricevi la deziraĵojn estas sufero ..... Ĉi tio, do, ho monaĥoj, estas la eminenta vero pri la malfaro de la sufero: la kompleta malfaro de tiu soifo (al potenco, volupto, ktp. G.H.) per neniigo de la pasioj".

Ĉu ankaŭ ĉi tiuj citaĵoj estas el la libro de Thomas aŭ alia sanktulo eklezia? Ne, la unua estas el la *Bhagavad Gita*, Hinda verko, tradukita de Lorenz II 71,72. La dua estas parto el la unua prediko de Budho. El tri fontoj ni lernas venki la suferon per neniigo de la deziroj. Laŭ mia gusto Thomas imitas pli Budhon ol Kriston.

Ĉu mi estas lojala al Thomas? Mi ne scias. Ofte okazas ke leganto ĝuste atentis pri tiuj partoj el la libro, kiuj ne estas por li. Gepatroj legas ke la infanoj „respektu siajn gepatrojn", infanoj legas ke „gepatroj ne kolerigu siajn infanojn". En la tempo kiam Thomas vivis estis necese atentigi pri tio, ke fieruloj iom malfierigu, potenculoj iom malgravigu sin. Sed ĝuste la malfieruloj legas la enhavon trovante motivon por sia retiriĝemo. Tiele la sekvo de la libro povas esti alia ol la aŭtoro celis. Nepre miaj riproĉoj trafas tiujn homojn, kiuj eĉ hodiaŭ predikas ĉi tiajn ideojn.

### 4. Lingvaj rimarkoj.

Pri la lingvo de ĉi tiu recenzo mi volas diri ion. Por kapti la koncepton de Thomas mi kelkfoje uzis radikojn verbajn prepozicie. Iuj plendos ke tia lingvuzo estas malfacile komprenbla. Kion signifas „Thomas am la homoj" alian ol „Thomas amas la homojn?" Mi tute konsentas. Tamen la malfacilaĵojn ne kaŭzas mia lingvuzo, sed la malfacila koncepto.

Mezepoke oni diris pri Dio, ke Li estas nemoviĝanta movanto. Kion signifas tiu esprimo? Laŭ tiutempaj opinioj ĉiu moviĝo estas kaŭzata de alia moviĝo. Serĉadante la kaŭzon de la kaŭzo, oni atingis la unuan kaŭzon: Dion. Sed ne decus por Dio se Li moviĝus; Li estu Eternulo maltempa, senokaza. La Kaŭzo unua ne moviĝas, tamen movas. Tiun koncepton mi volas kapti pli klare per la prepozicio abstrakta: Dio mov la mondo. Inter Dio kaj la mondo estas la rilato „mov", sed tiu rilato ne enestas la tempon; ĝi estas eterna rilato. Se Dio movus la mondon, Li mem moviĝus; se Dio ne movus la mondon, la mondo ne moviĝus. Ambaŭ implicaĵojn oni rifuzis; tial la prepozicio abstrakta: Dio mov la mondo. Iom pli elsalte ni povas esprimi la koncepton Mezepokan: Senmova Dio kre la mondo. Ne miru ke la teologoj ĉie trovas Dion, kaj la natursciencistoj nenie. Ja la naturscienco esploras nur okazojn: la teologio eblojn por eterna harmonio.

Klara bildo de ĉi tia ideformo troviĝas en *Apokalipso* 4:6, „antaŭ la trono (de Dio) kvazaŭ vitra maro, simile al kristalo". Johano vidas ion ondajn, sed

la ondoj ne moviĝas, estas kvazaŭ vitraj ondoj. Johano vidas antaŭ Dio maron onda, sed ne ondanta. Eterno ne estas senĉesa tempo, sed stagno: skemo.

Estas tri kampoj de homa penso, kiuj esence postulas lingvon senverban: la logiko, la matematiko kaj la mistiko. Ja tiuj tri kampoj ne okupiĝas pri okazoj, faktoj; ili esploras aŭ kontemplas nur eternon, skemojn, rilatojn. Ili lasas la strukturojn ekster la tempo.

Ne riproĉu min, ke mi uzas Esperanton laŭ reguloj nekutimaj; mi ja volas kapti nekutimajn konceptojn. Hazarde mi finis la studon pri lingva kapto de strukturoj, antaŭ kiam mi legis la verkon de Thomas. Aliuokaze mi ne estus kompreninta la esencon de lia mistiko tiom klare. Ne estas malfacilaĵo de mia lingvuzo, se oni ne povas traduki miajn frazojn en sian nacian lingvon, por kompreni la enhavon per sia gepatra: estas la forto de nia lingvo ke ni povas kapti ideojn, kiujn almenaŭ mi ne povas kapti per iu alia; ni fieru pri tio, kaj konsci ke komplete regebla lingvo estas forta esplorilo scienca.

### 5. Neŭtraleco.

Religiajn konceptojn mi kritikegis. Ĉu tio estas konforma al la neŭtraleco de ISAE? Multaj homoj ja ŝatas, ke oni ne pensigu ilin pri ilia vivobazo. Laŭ mi estas du formoj de neŭtraleco. La pasiva formo enhavas ke neniu rajtas kritiki ies opinion. Tiu formo garantias kompletan animtrankvilon por la legantoj.

Aktiva neŭtraleco signifas ke ĉiu rajtas kritiki ĉies opiniojn. Ĉi tiu formo estas nepra kondiĉo por scienca esploro. Por la moralaj sciencoj tio estas evidenta: ĉiu kiu studas pri juro, pri ekonomio, pri religio aŭ pri io tia, nepre asertas ion, kion iu alia indigne forrifuzas. La historio pruvis, ke eĉ la natursciencoj ne povas evolui sen atakoj kontraŭ alies konvinkoj. Akra estis la batalo pri la aĝo de la tero, pri la planeda sistemo, pri la parenceco inter homo kaj simioj. Por scienca asocio eblas nur unu formo de neŭtraleco: la aktiva.

Ĝuste tial mi donis al ĉi tiu recenzo la formon artikolan. Ĉiu konsci ke li plenrajtas kontraŭargumenti; prefere li ne nur protestu.

620.9 : 523.7 : 621.383 : 546.28

### SUNO-PILARO.

El „*Discovery*” de Septembro, 1954, p. 383, kun permeso de la redaktoro, tradukita de T.L.C.B.

Oni anoncis el la „*Bell Telephone Laboratories*”, ke pilaro estas elpensita, kiu uzas sunlumon kiel fonton de energio, kaj kiu estigas sufiĉe da potenco por funkciigi ludilojn, aŭ transsendi voĉojn ĝis mallongaj distancoj. Oni pretendas, ke la efikeco de la pilaro, pro tio ke ĝi ŝanĝas sunlumon rekte al

elektro, estas 6%, kio kompariĝas favore kun la efikeco de vaporaj kaj petrolaj maŝinoj, kontraste kun aliaj foto-elektraj elpensadoj, kies efikeco ne estas pli granda ol 1%.

La eksperimenta suno-pilaro uzas striojn, maldikegajn kiel oblatojn, de silicio; ili estas ĉirkaŭe tiel grandaj, kiel razoklingoj. Ĉi tiuj strioj estas treege lum-impresigeblaj, kaj oni povas ilin kunligi elektre, kaj provizi el la sunlumo potencon, kies kvanto estas po 50 vatoj por ĉiu kvadrata jardo da supraĵo (60 vatoj sur 1 m<sup>2</sup>, Red.).

La suno-pilaro, kune kun aliaj siliciaj elpensadoj, kiujn oni elmontris en la laboratorioj, ŝajne estas flankajo de ampleksa esploro pri la silicio kaj pri la ebleco ĝin apliki ĉe la moderna elektrona scienco. Grava trajto de tiuj siliciaj elpensadoj estas, ke ili povas funkcii je multe pli altaj temperaturoj ol aliaj kristalaj rektigiloj (unudirektigiloj), kiujn ni nuntempe kutimas uzi.

620.9 : 523.7 : 621.383 : 546.482.21

### ELEKTRO EL LA SUNO.

El la „*Listener*” de la 19-a de Aŭgusto, 1954, (p. 275) kun permeso de la redaktoro tradukita de T.L.C.B.

En Usona laboratorio lumo el la suno nuntempe funkciigas etan elektran generatoron, kiu siavice funkciigas elektran horloĝon. Sciencistoj kredas pri la ebleco de multe pli fortaj generatoroj por multe pli grandaj taskoj, sed funkciaj laŭ la sama principo, ke la lumo transformiĝas en la elektran energion. La principo estas disvolvita de la *United States Air Force Research and Development Centre* (ejo de la Usona aerarmeo por la esplorado kaj utiligado), en Dayton, Ohio. S-ro Douglas Willis, kiu estas ano de la oficistaro en Washington de la B.B.C., parolis pri ĝi en la programero „*Eye-witness*” (vidinto).

Li diris jene: „La eltrovon faris la sciencistoj de la aerarmeo, kiuj laboras en unu el la dekdu laboratorioj, kiuj troviĝas apud la 1300 akreoj (520 ha, Red.) de la kampo de Wright en la Mad River Valley je dek mejloj oriente de Dayton, Ohio. Ĝi estas la plej granda unuopa instalaĵo de la militista distrikto („*Command*”), kaj multaj el la plej gravaj eltrovoj ĉe la disvolviĝo de la aviado en Usono estas faritaj en ĉi tiu ejo.

Unu el la sciencistoj, kiuj estigis la elektran generatoron, estas kolonelo de la aerarmeo, kiu diris al mi ke la ideo pri la generatoro venis al ili en la menson hazarde. Ili interesiĝis pri la proprecoj de la kadmia sulfido por aliaj celoj, sed ili trovis, ke ne estas eble ĝin aliformigi en kristalojn, ĝis ili sukcesis tion fari, vaporigante la sulfidon en maniero iom simila al tiu, per kiu oni estigas la solidan karbonan dioksidon. Kiam ili jam elfaris tion, ili baldaŭ eltrovis, ke oni povas ĝin uzi por provizi elektran fluon el lumo. La aerarmeo konsideras,